KONVERSACIA

LITERATURO

6

LA LITERATURON SKRIBIS
LA PERSONOJ EN LA KONVERSACIO.

Espr. 485 I

Ĉiu rajto rezervita.

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto,
Den Haag, Riouwstraat 172.

Bonan tagon !

Gesinjoroj, ĉu vi konas min?

Mi estas Bonzo, la plej inteligenta hundo en la tuta mondo.

Ĉiu homo de ĉiu popolo konas min, ĉar mia bildo estas en ĉiu gazeto de ĉiuj kvin mondpartoj.

Gesinjoroj, mi salutas vin ĉiujn. Mi salutas vin en la Esperanta lingvo kaj mi petas, ke vi ĉiuj amu min. Ankaŭ mi amas vin kaj mi estas fidela al vi. Mi estas fidela, ĉar mi estas hundo, ne homo.

En la nunaj facilaj tempoj

la plej grava laboro de la homoj estas: **danci.**

„Danci" signifas: levi la piedojn elegante (rigardu la bildon!)

La historio de la mondo instruas, ke la homoj ŝatis danci en ĉiu jarmilo kaj jarcento. Sed en nia tempo la homoj dancas ĉiutage. Ili dancas nokte kaj tage, matene kaj vespere, ĉe la tagmanĝo kaj ĉe la vespermanĝo.

La kuracistoj diras, ke la danco estas tre bona gimnastiko, ĉar ĝi maldikigas...

La tempo.

Demando :

Kiam ?

Respondoj :

Hieraŭ, hodiaŭ.
Nokte. Tage. Vespere.
Lunde. Marde.
La 13-an de Aprilo 1931.
Je la 5-a horo kaj duono.
Antaŭ kvar tagoj.

La bona medikamento. [1])

Sinjorino venas al la **kuracisto.** [3]) Ili parolas:

—Sinjorino, kion deziras vi? Ĉu vi estas malsana?

— Sinjoro doktoro, mi ne estas malsana, sed mi estas malfeliĉa.

— Kial?

— Ĉar mi ne povas dormi dum la noktoj.

— Kial vi ne povas dormi?

— Ĉar mia edzo parolas dum la tuta nokto en la dormo.

— Sinjorino, mi gratulas al vi! Vi devas esti tre feliĉa!

— Kial?

— Ĉar vi povas aŭdi la sekretojn de via edzo.

— Jes, mi povas aŭdi, sed mi ne povas kompreni.

— Kial vi ne povas kompreni?

— Ĉar mia edzo parolas en la Esperanta lingvo.

— Sinjorino, ne estu malfeliĉa, sed estu inteligenta! Aŭskultu! La plej bona medikamento estas: lernu ankaŭ vi la Esperantan lingvon!

[1]) Medikamento = objekto, kiu sanigas la malsanan homon.
[2]) Kuracisto = homo, kiu sanigas la malsanan homon.

Gesinjoroj,

mi estas la **cikonio,** la plej grava birdo en la tuta mondo.

Mi havas en la akvo multajn infanojn kaj mi volas porti ilin al vi.

Ĉu vi volas ricevi belajn, sanajn, ĉarmajn infanojn?

Se jes, skribu al mi!!

Mi salutas vin ĝis la revido!

Ciko Nio.

En la lernejo.

La instruisto: — Infanoj, aŭskultu! Ĉu vi scias, kio estas „fianĉo" kaj „fianĉino"?

La lernantoj: — Jes, ni scias.

La instruisto: — Ĉu vi vidis fianĉon kaj fianĉinon?

La lernantoj: — Jes, ni vidis!

La instruisto: — Kian veston havas la fianĉino?

La lernantoj: — Blankan veston!

La instruisto: — Ĉu vi scias, kial?

La lernantoj: — Ni ne scias!

La instruisto: — Infanoj, aŭskultu! La fianĉino havas blankan veston, ĉar tiu tago estas la plej feliĉa en ŝia vivo! Ĉu vi komprenas?

La lernantoj: — Jes, ni komprenas!

La malgranda Paŭlo: — Sinjoro instruisto! Kaj kial havas la fianĉo **nigran** veston?

„Nur laboristo"

Vera historio.

Skribis s-ro A. O., Stokholmo, Svedlando.

1.

Kiam mi estis pli juna, mi vojaĝis en multaj landoj. Mi estis en Ameriko kaj en kelkaj landoj de Eŭropo. Mi vivis ankaŭ en la bela urbo Parizo. Tie mi laboris dum kelkaj monatoj en granda fabriko. En unu vespero mi vizitis balon, ĉar mi tre ŝatas danci. En la balo mi vidis unu dolĉan, junan fraŭlinon. Ŝi estis sveda fraŭlino. Mi salutis ŝin kaj ni parolis. Ŝi diris al mi: „Mi kaj la svedaj sinjorinoj en Parizo ŝatas la svedajn sinjorojn." Mi estis tre feliĉa kaj mi parolis kaj dancis kun ŝi. Kaj mi demandis: „Fraŭlino, kio plaĉas al vi?" Kaj ni manĝis kaj trinkis...

2.

En momento la fraŭlino rigardis al mia mano kaj demandis: „Kio estas sur via mano?"

„Kara fraŭlino, mia mano sur ĉi tiu parto antaŭ kelkaj semajnoj estis malsana, ĉar la maŝino tuŝis ĝin en la fabriko, kie mi faras aŭtomobilojn."

Tiam mia fraŭlino levis sian nazon kaj diris:

Ah, vi estas **nur laboristo!**

Post tio ŝi ne parolis kun mi. Ŝi iris de mi kaj ŝi dancis kaj trinkis kun aliaj personoj.

3.

Multaj tagoj venis kaj iris. Hieraŭ mi promenis per mia aŭtomobilo en la stratoj de Stokholmo. Inter la homoj mi vidis la dolĉan fraŭlinon el la balo en Parizo. Ŝi salutis min kaj diris:

— Mi deziras promeni kun vi. Ĉu vi estas sola?

— Jes, — mi respondis — mi promenas sola, ĉar mi estas **nur laboristo.**

Mi kun la aŭtomobilo iris kaj la fraŭlino restis tie.

Mi estas feliĉa, ĉar mi estas **nur laboristo.**

Ĉi tiu horloĝo montras la dekduan horon, kvardek-unu minutojn kaj tridek-ok sekundojn.

Demando: **Kioma horo estas?**

Respondoj: **Estas la tria horo kaj kvarono (duono, tri kvaronoj, dek minutoj).**

La horloĝoj estas diversaj. La plej malbona horloĝo estas la **vekhorloĝo,** ĉar matene ĝi **vekas** la homon per maldolĉa muziko kaj ĝi rompas la belajn sonĝojn.

La horloĝo estas granda malamiko de la feliĉaj homoj. Gesinjoroj, se vi malŝatas la horloĝon, tio signifas, ke vi estas feliĉaj homoj.

Gesinjoroj, malŝatu la horloĝon en ĉiu tago de via vivo!!

NIK NEK KAJ KAT JEN

(Malgranda romano)

Sesa parto.

En la frua matena horo Kat Jen levas sin. Ŝi rigardas la horloĝon. Estas la sesa horo kaj duono. Ŝi lavas kaj vestas sin, prenas plumon kaj skribas leteron al sia sola onklino, al la maljuna sinjorino Tea Kuler, kiu estas la fratino de ŝia patro. Kat Jen skribas al ŝi pri sia granda feliĉo. Kat metas la leteron en koverton kaj iras promeni.

Bela varma tago, ŝi pensas kaj rememoras, ke ŝia naskiĝtago estas proksime. Ho, tre bona! Ŝi volas fari simplan, sed bonan vespermanĝon kaj peti la viziton de la maljuna Mate Matik. Nu, ankaŭ Bub Destrat venu, ŝi pensas, ĉar li estas bona kaj malriĉa knabo. La granda horloĝo montras jam la duonon post la oka horo kaj ŝi iras al sia kontoro.

El proksima strato venas al ŝi Elsa Nurmin. Ŝi estas tre eleganta, ĉar ŝiaj gepatroj estas tre riĉaj. Elsa Nurmin salutas fraŭlinon Kat Jen.

— Bonan matenon, Kat! Kien vi iras?

— Bonan matenon, Elsa! Mi iras en mian kontoron labori — kaj Kat metas sian manon en la manon de Elsa. Kat atentas, ke Elsa povu vidi la fianĉinan ringon.

Elsa Nurmin rigardas la belan ringon dum mallonga momento kaj gratulas.

—Mi ne sciis, ke vi estas fianĉino. Mi gratulas. Kiu estas la feliĉa fianĉo?

— Vi scias.

— Ĉu mi scias?... Unu el viaj direktoroj. Monenpoŝ. Ĉu ne?... Aŭ unu el viaj kolegoj?

— Ne! Mia fianĉo estas la „interesa" homo... la **nur** interesa homo...

— Ĉu sinjoro Nik Nek?... Ne diru!...

— Jes, mi diras! Ĉu vi ne **volas** kredi aŭ vi ne **povas** kredi?

— Nu, mi kredas, **se** vi diras kaj... kaj... mi gratulas, sed... Ĉu vi scias, mi devas promeni en ĉiu mateno kaj... Nu, mi gratulas!

— Ankaŭ mi iras al mia laboro. Mi estas jam post la promeno. Ĝis revido!

— Ĝis revido, Kat! Estas tre interesa, ke vi kaj sinjoro Nik Nek... Kion diras la gesinjoroj en la konversacio?

— Kial? Ĉu esti fianĉino signifas malbonon?

— Ne, sed nur kelkaj semajnoj kaj... Tre interesa! Vi kaj sinjoro Nik Nek... Mi ne kuraĝis pensi tion. Li estas interesa homo.

— Li estas ne nur interesa, sed ankaŭ bona homo.

— Jes, jes. Li estas bona homo, ĉar li volas esti via edzo. Nu, ĝis revido!

— Kion vi volas diri per tio?

— Nu, Kat, mi diras al vi la puran veron. Mi pensas, ke vi kaj sinjoro Nik Nek ne pensas pri la malfacila vivo. Li estas **nur** interesa homo kaj vi estas **nur** oficistino. Vi ne pensas pri la ĉiutaga pano. Ĉu vi povas manĝi la amon?

— Mi komprenas vin. Ni estas malriĉaj. Sed ne

forgesu, ke ni povas kaj volas kaj ŝatas labori. Ni faras la panon per laboro kaj nia amo estas sur ĝi la butero. Kaj ne forgesu, ke ankaŭ Dio helpas nin!

— Se vi kredas!... Sed ne pensu, ke mi... ke mi ne estas via bona amikino.

— Ho, Elsa, mi scias, kia bona amikino vi estas.

Elsa Nurmin ne komprenas la lastan frazon de Kat. Per la kapo ŝi salutas kaj iras. Kat Jen iras al la kontoro.

Elsa Nurmin ne promenas, sed ŝi iras en vendejon kaj petas leterpaperon kaj plumon. Ŝi skribas sennoman leteron al sinjoro Nik Nek. Kial? Ŝi ne scias tion, sed ŝi sentas grandan malamon al fraŭlino Kat Jen.

* * *

La horloĝo batas la naŭan horon, kiam Kat Jen alvenas al sia kontoro. Antaŭ la pordo staras du policistoj. Unu el ili demandas ŝin.



— Kien, fraŭlino?

— Al mia kontoro. Mi laboras en la kontoro de sinjoroj Kapsenmon kaj Monenpoŝ.

— Eniru, fraŭlino — diras la policisto kaj li malfermas la pordon. Kat eniras en la antaŭĉambron, sed ŝi devas fari grandajn okulojn, ĉar en la antaŭĉambro ŝi vidas policiston kaj homojn, kiujn ŝi ne konas.

— Kio estas ĉi tie? — ŝi demandas.

Unu el la sinjoroj paŝas al ŝi kaj diras:

— Fraŭlino, mi estas detektivo. Ĉu vi estas fraŭlino Kat Jen, la oficistino de la kontoro?

— Jes, sinjoro. Sed diru, kion vi volas? Mi ne komprenas.

— Fraŭlino, ĉu vi scias, kial ne vivas sinjoro Monenpoŝ?

— Kion vi diras? Ĉu sinjoro Monenpoŝ mortis?

— Jes, li mortis. La knabo diras, ke vi estis la lasta, kiu parolis kun li kaj tial ni volas scii, kiam vi eliris el la kontoro?!

— Precize je la sesa horo kaj duono. Du minutojn antaŭ mi eliris Bub Destrat, la juna servisto-knabo. Li portis leteron al sinjoro Kapsenmon.

— Ĉu vi ne eraras, fraŭlino? La knabo diras, ke li revenis post kvaronhoro kaj volis eniri en la malgrandan kontoron de la direktoroj, ĉar li volis malfermi la fenestron. Sed sinjoro Monenpoŝ diris, ke li ne eniru, ĉar vi laboras tie. Tiam la knabo eliris.

— Sinjoro, mi ne komprenas vin. Mi komprenas absolute nenion. Mi estis dum la vespero kun mia fianĉo. La sinjoro direktoro diris, ke mi povas iri hejmen. Ankaŭ sinjoro Mate Matik kaj Bub Destrat scias tion.

— Ni scias tion, fraŭlino. Sinjoro Matik jam diris tion al ni. Sed ni devas demandi vin. Kial diris la direktoro al la knabo, ke vi laboras en la kontoro, se vi ne estis tie?

— Mi ne scias. Ne demandu min pri tio, kion mi ne povas scii... Mi diras al vi, ke post la sesa kaj duono mi estis en la proksima parko kun mia fianĉo.

— Ankaŭ tion ni scias, ĉar la knabo diris, ke vi estis tie ĝis la **naŭa** horo.

— De kiu li scias tion?

— Li vidis vin, ĉar li iris apud la parko, kiam vi eliris kun via fianĉo. Li salutis vin, sed vi ne aŭdis.

— Kaj kiam mortis sinjoro Monenpoŝ?

— Tion ni ne scias. Hodiaŭ matene li sidis en la granda seĝo sen vivo. Kaj la mono estas nenie!

— Ĉu la mono... estas nenie?

— Jes, tiu alta sumo, tiu granda koverto kun la bankbiletoj. Ankaŭ vi estis en la kontoro, kiam la bankservisto portis ĝin kaj donis ĝin al sinjoro Monenpoŝ.

— Jes, mi estis tiam en la ĉambro, sed poste mi ne vidis la monon... Ĉu vi pensas, ke mi... mi... Ho, Dio, helpu min!

— Nu, ne vi, sed via fianĉo.....

— Mia fianĉo estas la plej bona homo en la tuta mondo... Mi povas diri nur tion, ke mi ne estis en la kontoro post la sesa kaj duono kaj mi ne revenis ĉi tien. Mi ne scias, kial la direktoro diris al la knabo, ke mi laboras en lia ĉambro. Mi scias nenion! Ho, Dio helpu min!

— Ne ploru, fraŭlino! Se vi estas pura en la koro, vi...

— Ĉu mi estas pura en la koro? Jes, jes, jes! Kaj ankaŭ mia fianĉo. Absolute! Hieraŭ ni havis la plej belan, plej feliĉan vesperon, kian povas havi nur tiuj homoj, kiuj havas puran koron kaj hodiaŭ... ho, mi estas tre malfeliĉa.

El la granda kontorĉambro elvenas kelkaj homoj. Ĉiuj estas viroj. Unu kuracisto, unu policisto, detektivoj kaj sinjoro Mate Matik kun Bub Destrat.

— Sinjoro Monenpoŝ mortis — diras la doktoro — kaj ne alia homo mortigis lin.

— Sinjoro doktoro, mi kredas al viaj vortoj, sed kie estas la mono kaj kial diris la malfeliĉa homo al la knabo, ke fraŭlino Kat Jen estas en la kontoro... Ah, ĉu ŝi estas la fraŭlino — demandas la policisto la detektivon, kiu staras apud Kat Jen.

— Jes.

— Ĉu vi jam demandis ŝin pri ĉio?

— Jes, sed ŝi scias nenion. Ŝi iris el la kontoro je la sesa kaj duono. La librotenisto kaj la servisto-knabo diras la veron. Unu el miaj kolegoj nun estas ĉe ŝia fianĉo kaj li demandas lin pri la hieraŭa vespero.

— Fraŭlino, mi petas vin, venu en la ĉambron, ĉar ankaŭ mi havas kelkajn demandojn al vi.

Sinjoro Mate Matik kaj Bub Destrat restas en la antaŭĉambro. Kat Jen kun la policisto kaj detektivo iras en la kontorĉambron. Tie sidas sinjoro Kapsenmon ĉe la granda skribotablo.

... ...

La demandoj lacigis la kapon de fraŭlino Kat Jen. Ŝiaj belaj okuloj estas ruĝaj. Antaŭ li staras Bub Destrat kaj li diras la lastajn vortojn de la direktoro Monenpoŝ.

— Sed Bub, mi ne estis en la ĉambro. Mi ne komprenas, kial povis la direktoro diri tion al vi. Ĉu vi ne aŭdis, kiam li diris al mi, ke li ne deziras mian laboron?

La koro de Bub Destrat estas tre mola. Li sentas, ke Kat Jen havas puran koron. Li ne povas rigardi al ŝiaj okuloj kaj tial li rigardas nur al la planko.

— Jes, mi scias kaj mi sentas, ke vi diras la veron, fraŭlino, sed mi devas diri nur tion, kion la sinjoro

direktoro Monenpoŝ... kion la sinjoro direk... kion... Ho! Hoho! — Bub Destrat rigardas al la planko — Sinjoro policisto, sinjoro policisto...

— Kio estas al vi?

— Nenio, sinjoro policisto... nenio... Sed mi scias, ke fraŭlino Kat Jen ne estis tiam en la ĉambro. Mi scias... kaj mi scias, kiu estis tiam en la ĉambro... Jes, mi scias...

— Kiu? Diru! Kiu?

— Sinjoro policisto, mi ne povas diri tion... nun ne... Nur al vi! Nur al vi sola! Diru al la gesinjoroj, ke ili iru el la ĉambro.

Post minuto Bub Destrat kaj la policisto restas solaj en la ĉambro.

— Nu, knabo, parolu! Kiu estis tiam en la ĉambro?

Bub Destrat montras al la planko.

— Tiu!... Tiu, al kiu apartenas tiu malgranda objekto... Rigardu! Tie... tie!

La policisto rigardas al la loko, kiun Bub Destrat montras kaj li vidas malgrandan butonon. Malgranda blua butono. Li prenas kaj rigardas ĝin. Interesa butono. Ĝi apartenis al virina vesto.

— Al kiu vesto ĝi apartenas, ĉu vi scias?

— Jes, sinjoro policisto. Mi scias... Ĝi apartenas al la nova vesto de sinjorino Kapsenmon.

— Kion vi volas diri per tio?

— Nur tion, sinjoro policisto, ke la butono hieraŭ ne estis en la ĉambro, ĉar hieraŭ matene mi purigis

la **tutan** plankon kaj dum la tago la sinjorino **ne** faris viziton en la kontoro. Nur tion mi volis diri.

— Knabo, ĉu vi scias, ke viaj vortoj povas fari novan tragedion?

— Jes, mi scias kaj tial mi ne parolas. Mi estas diskreta knabo. Mi silentas.

—Ĉar vi estas diskreta, mi scias jam ĉion. Vi ŝatas aŭskulti ĉe la pordoj. Ĉe ne? Nu, respondu!

... ...

Bub Destrat venas el la ĉambro. Malantaŭ li staras la policisto. Li parolas al la detektivoj.

— Sinjoroj, fraŭlino Kat Jen estas pura. La knabo diris tre interesajn aferojn. Mi petas vin ĉiujn, venu en la ĉambron. Sinjoro Kapsenmon, mi petas vin, restu en la malgranda ĉambro, ĉar ni devas paroli kun vi post kelkaj minutoj. Fraŭlino, vi povas iri aŭ resti!

Kat Jen senvorte salutas la sinjoron policiston kaj la detektivojn kaj ŝi eliras. Ŝi iras al Nik Nek. Kio estas al li?

... ...

Vespero. Nik Nek kaj Kat Jen sidas ĉe malgranda tablo en bona restoracio. Li tenas en la manoj gazeton. Dikaj literoj sur la unua paĝo: „Morto de M. Monenpoŝ. Familia tragedio. 250000 frankoj en la skribotablo de K. Kapsenmon. Kapsenmon neas. Lia edzino jesas."

— Ho, malbela mondo! — diras Nik Nek. — Mi ne ŝatas legi pri tiaj aferoj.

— Kara Nik, fo
gesi. Mi ne volas
la bonaĵoj. Sinjoro
estas ĉe la polico l

— Sed vi ne r
post kvar semajnoj
kaj bona mastrino.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL
Esperanto
485 1

Ili rigardas unu la alian. Longa, longa silento. Nik Nek ridas kaj Kat Jen estas tre tre feliĉa. Ŝi forgesas la malbonan tagon.

— Nik, rigardu vian kalendaron! Kio estas hodiaŭ?

— Estas merkredo. Sed kial vi demandas?

— Ĉar sabate estas mia naskiĝtago. Kaj mi petas vin, vizitu sabate vespere mian hejmon kaj manĝu kun mi simplan vespermanĝon. Mi invitis ankaŭ sinjoron Mate Matik kaj la knabon Bub Destrat. Ĉu vi volas veni?

— Jes, mi dankas! Je kioma horo?

—Je la oka horo kaj dek minutoj.

— Kara Kat, ĉi tiu sabato estas al mi duobla festotago.

—Kial? Diru!

— Hodiaŭ mi ne povas diri tion.

— Sed kiam?

—Sabate vespere ĉe la tablo.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL